

LI REKONIĜIS AL ILI EL LA DISPECIGO DE LA PANO

Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Luko 24, 13-35

Du disĉiploj de Jesuo, en la sama tago de lia reviviĝo, iris al vilaĝo nomata Emaus, kiu estas malproksime de Jerusalemo je sesdek stadioj. Dumvoje ili parolis unu al la alia pri tio, kio okazis en Jerusalemo ĝuste en tiuj tagoj. Dum ili interparolis kaj diskutis, Jesuo mem alproksimiĝis kaj kuniĝis al ili. Sed ili ne rekonis Lin, ĉar iliaj okuloj estis kvazaŭ blindaj. Jesuo diris al ili: „Pri kio vi parolas dum via irado?” Ili haltis kun malgaja mieno. Unu el ili, nomata Kleopas, responde diris al Li: „Ĉu nur Vi sola en Jerusalemo ne scias tion, kio okazis dum ĉi tiuj tagoj?” Jesuo diris: „Kio?” Ili respondis: „Tio pri Jesuo, la nazaretano! Li estis profeto potenca age kaj parole antaŭ Dio kaj la tuta popolo. Sed la ĉefpastroj kaj niaj altranguloj kondamnis Lin al morto kaj Lin krucumigis. Ni esperis, ke Li estos la liberiganto de Izraelo, sed jam pasis tri tagoj de kiam tio okazis. Verdire io emociis nin. El nia grupo kelkaj virinoj, irinte frumatene al la tombo, ne trovis lian korpon. Tiam ili revenis, dirante ke ili havis vizion: anĝeloj anoncis al ili, ke Jesuo vivas. Poste iris al la tombo aliaj el nia kunularo, kaj trovis ĉion, kiel diris la virinoj; sed Lin, Jesuon, ili ne vidis.” Tiam Jesuo diris: „Vere tro malmulte vi komprenas, kaj tro malviglaj vi estas pri kredo je tio, kion la profetoj diris! Ĉu la Mesio ne devis suferi ĉi tion antaŭ sia eniro en la gloron?” Tiam Jesuo klarigis al la du disĉiploj la profetaĵojn, kiuj rilatas Lin mem. Li komencis ĉe la libro de Moseo ĝis tiuj de la aliaj profetoj.

Dume ili alvenis al la vilaĝo, al kiu ili estis direktitaj; kaj Jesuo ŝajnis kvazaŭ Li volus pluri. Sed ili retenis Lin, dirante: „Restu ĉe ni, ĉar estas preskaŭ vespere, kaj la suno jam subiras.” Tiel Jesuo eniris por resti ĉe ili. Poste Li sidis kun ili ĉe la tablo, prenis la panon, eldiris benan preĝon, dispecigis kaj disdonis al ili. Tiumomente iliaj okuloj malfermiĝis, kaj ili rekonis Lin. Sed Li fariĝis nevidebla por ili. Tiam ili diris unu al la alia: „Ĉu nia koro ne brulis dum Li parolis kun ni sur la vojo, klarigante al ni la Skribojn?” En tiu sama horo ili leviĝis kaj reiris al Jerusalemo. Tie ili trovis la dek unu apostolojn kunigitaj kun aliaj disĉiploj. Ili diris: „La Sinjoro vere reviviĝis kaj aperis al Petro.” Siavice la du disĉiploj rakontis tion, kio okazis al ili sur la vojo, kaj kiel ili rekonis Lin dum la dispecigo de la pano.

La morto de Jesuo kaŭzis la disperdiĝon, la konfuzon en la grupo de la disĉiploj. La virinoj serĉas Lin kie Li ne estas, en la tombo, kaj ili trovas du virojn kiuj diras al la virinoj: "Kial vi serĉas la vivanton inter la mortintoj?". La viroj, kontraŭe, la disĉiploj, iras direkte al la historio, al la pasinteco, al glora loko de Izraelo, kiu memorigu la grandan venkon de Israelo super la paganaj popoloj. Ni vidu kion skribas la evangeliisto Luko ĉe ĉapitro 24, ekde versiklo 13.

"En la sama tago," la tago de la reviviĝo, *"du disĉiploj de Jesuo iris al vilaĝo nomata Emaus"*, kial ili iras al Emaus? Emaus estas fama en la historio de Izraelo, ni trovas indikojn pri ĝi en la unua libro de Makabeoj, je la kvara ĉapitro, pro batalo kiun Judaso la Makabeo faris kontraŭ la paganoj, venkante ilin; ĝi estis granda venko kaj, kiel estas skribite en ĉi tiu unua libro de Makabeoj, "Tiam scios ĉiuj popoloj, ke ekzistas Tiu, kiu liberigas kaj savas Izraelon.". La mesio, tiom atendita, estis tiu, kiu elaĉetos kaj savos Izraelon, kaj kontraŭe Jesuo estis venkita, li estis granda elreviĝo. El la evangelioj ŝajnas evidentiĝi, ke la disĉiploj estis pli elrevitaj de la releviĝo de Jesuo, ol de lia morto, ĉar se Jesuo estis simple mortinta, tio signifis, ke ili eraris. Leviĝis tiutempe multaj pseŭdo-mesioj, sufiĉas pensi pri Judaso la Galileano, Teudas, kiuj arigis homamason, kiu ribelis kontraŭ la Romianoj, kaj ĉiam ĉio finiĝis per amasbuĉado. Nu, post la morto de iu mesio, oni atendis alian. Sed se Jesuo releviĝis, tio signifas ke ĉiuj iliaj revoj pri gloro, pri restarigo, pri liberigo de Izraelo, pri superregado super la Romianoj, tio ja pereis.

Sed ni vidu la tekston. Do *"Dumvoje ili parolis unu al la alia pri tio, kio okazis en Jerusalemo ĝuste en tiuj tagoj. Dum ili interparolis kaj diskutis, Jesuo mem alproksimiĝis kaj kuniĝis al ili."*, Jesuo estas la paŝtisto kiu ne forlasas siajn disĉiplojn. Sed, skribas la evangeliisto, *"ili ne rekonis Lin, ĉar iliaj okuloj estis kvazaŭ blindaj."* Kial la okuloj de ĉi tiuj disĉiploj estas retenataj de la rekono? Estas klare, ili rigardas al la pasinteco, kaj ne povas vidi la nuntempon kaj la estonton, kien Jesuo kondukas ilin. *"Jesuo diris al ili: „Pri kio vi parolas dum via irado?". Ili haltis kun malgaja mieno. Unu el ili, nomata Kleopas, Kleopas estas la mallongigo de Kleopatros, kiu signifas "el glora, elstara patro", kiu komprenigas la sintenon, la senton de ĉi tiuj disĉiploj, ili serĉas la gloron de sia popolo. Kaj tiu Kleopas miras, "responde diris al Li: „Ĉu nur Vi sola en Jerusalemo ne scias tion, kio okazis dum ĉi tiuj tagoj?"*, kaj rakontas al Li tion kio koncernas Jesuon la Nazaretanon. Jen, laŭ ili Jesuo estis la Nazaretano, Nazaretano signifis la ribelulon, revoluciulon, jen tio, kion ili estis kredintaj sekvi: iu mesio kiu venkos la Romianojn. Kaj jen la elreviĝo: *"la ĉefpastroj kaj niaj altranguloj"*, estas serioze, ke ĉi tiuj disĉiploj difinas "niaj altranguloj" tiujn, kiuj murdis ilian majstron. Kaj jen la elreviĝo, kiun ni aludis antaŭe: *"Ni esperis, ke Li estos la liberiganto de Izraelo"*, jen la granda elreviĝo: ili esperis en la mesio, kontraŭe li mortis, kaj la pruvo ke Jesuo ne estis la mesio estas lia morto, ĉar la mesio ne estus povinta morti, kaj jen la elreviĝo de la komunumo kiu estis metinta ĉiujn siajn esperojn en Jesuon.

"Verdire io emociis nin. El nia grupo kelkaj virinoj, irinte frumatene al la tombo, ne trovis lian korpon. Tiam ili revenis, dirante ke ili havis vizion: anĝeloj anoncis al ili, ke Jesuo vivas", sed, kun retenemo, ili ne asertas, ke ili

ne kredis al la virinoj, ĉar virinoj ne estas fidindaj atestantoj. Skribas la evangeliisto: *"tiuj vortoj ŝajnis al ili kiel babilado"*. Kaj jen la respondo de Jesuo fronte al ĉi tiu nekredemo, ĝi estas respondo kiu konsistigas riproĉon, *"«Vere tro malmulte vi komprenas, kaj tro malviglaj vi estas pri kredo je tio, kion la profetoj diris! Ĉu la Mesio ne devis"*, la verbo *devis*, indikas la volon de Dio ke Kristo trapasu ĉi tiujn suferojn, *"suferi ĉi tion"*. Tiam Jesuo klarigis al la du disĉiploj la profetaĵojn, kiuj rilatas Lin mem. Li komencis ĉe la libro de Moseo ĝis tiuj de la aliaj profetoj", estas grava ĉi tiu verbo klarigi, interpreti: ĝi estas la verbo de kiu devenas la faka termino hermeneŭtiko, kiu estas la arto aŭ la tekniko interpreti la tekstojn. Jesuo ne limiĝas legi la tekstojn de Moseo aŭ de la profetoj, aŭ rakonti ilin, sed Li interpetas ilin. Kion tio signifas? Jen kriterio valida por ni ĉiuj hodiaŭ, ĝi signifas, ke, por legi la Skribon, estas necese interpreti ĝin, sed kiel? Kun la sama spirito kiu inspiris ĝin, kaj kia estas tiu spirito, kiu inspiris la Skribon? La amo de la kreinto al ĉiuj siaj kreitaĵoj: jen la ununura kriterio kiu ebligas kompreni la Skribon.

"Dume ili alvenis al la vilaĝo," la vilaĝo estas ĉiam loko de la tradicio, de la pasinteco, do ili ankoraŭ ne komprenas, ili volas iri al la pasinteco, Jesuo ekvidigas, ke li intencas iri pluen, ili iras al la malnovo kaj Jesuo kontraŭe al la novo. La disĉiploj insistas kun Jesuo: *"Restu ĉe ni, ĉar estas preskaŭ vespere, kaj la suno jam subiras"*, kaj Jesuo, la paŝtisto kiu ne perdas siajn ŝafojn, restas kun ili.

"Poste Li sidis kun ili ĉe la tablo, prenis la panon,", kaj ĉi tie la evangeliisto proponas al ni la scenon de la lasta vespermanĝo, kun la samaj gestoj kaj la samaj faroj, *"eldiris benan preĝon, dispecigis kaj disdonis al ili."*, ni memoru, por kompreni ĉi tiun pecon, ke Luko estas la ununura evangeliisto laŭ kiu, en la momento de la vespermanĝo, Jesuo eldiras la vortojn *"ĉi tion faru por memorigo pri mi"*, do Jesuo ripetas sian ĉeeston, sian memorigon.

"Tiumomente iliaj okuloj malfermiĝis, kaj ili rekonis Lin.", jen, en la momento en kiu Jesuo manifestiĝas kiel tiu kiu dispecigas la panon, sian vivon por siaj disĉiploj, ili, la disĉiploj, Lin rekonas. *"Sed Li fariĝis nevidebla por ili."*, ĉi tie prave la verbo ne estas malaperi; ne, la evangeliisto skribas *"Li fariĝis nevidebla por ili"*, temas pri io alia, malaperi signifas ke Li ne plu estas, fariĝi nevidebla signifas ke Li estas, sed oni ne vidas Lin. Kial Jesuo igas sin nevidebla? Tion diras al ni la evangeliisto, ĉe la fino de ĉi tiu peco, *"En tiu sama horo ili leviĝis kaj reiris al Jerusalemo. La du disĉiploj rakontis tion, kio okazis al ili sur la vojo, kaj kiel ili rekonis Lin dum la dispecigo de la pano"*. Jen la mesaĝo, kiun Luko, la evangeliisto, postlasas por la komunumoj kaj por la kredantoj de ĉiuj tempoj: Jesuo estas nevidebla, ĉar Li igas sin videbla ĉiufoje kiam la komunumo dispecigas la panon.